

4/2021

Julio
Aŭgusto

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Kapti ôkazon por edukigo
- ★ Ĉu vi devenas el Mezopotamio?
- ★ Polaj venkoj kaj malvenkoj en Japanio

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Adreso de redakcio

Robert Kamiński, ul. Kwiatowa 1/3
94-227 Łódź

Kunlaboro

Teresa Nemere, Andrzej Sochacki,
Magdalena Tatara, Adam Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2021 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 53 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post
aldono de bankaj kostoj.
Polan Esperantiston eblas aboni per
Konto de PEA en UEA: peaa-v;
Detaloj trovas ĉe:
<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Fronta kovrilpaĝo - Nina Pietuchowska el Bjalistoko

Estraro de PEA

Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek - sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001
liberan monsumon priskribu
per vorto "Darowizna"



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Estraro informas	
<i>Ĉefa Estraro de PEA</i> , Rezolucio de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio	3
Eventoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Varsovia omaĝo	3
<i>Halina Komar</i> , Multkultura Vilaĝo Esperanto dum la Festivalo Pol'and' Rock 2021	6
<i>Robert Kamiński</i> , Radio TOK FM seriozas pri Esperanto	7
<i>Robert Kamiński</i> , Reta diskutlisto por poloj denove aperas	7
Mojose	
<i>www.pej.pl</i> , Pri JES kaj kronviruso	8
Raportoj, rakontoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Ĉu vi devenas el Mezopotamio? Ekkonu vian prapatrinon!	9
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , Ni savu la abelojn	11
<i>Robert Kamiński</i> , Kiu aŭtomobilo estis la plej multekosta en la historio?	12
<i>Robert Kamiński</i> , Unua elektra aviadilo en Eŭropo	14
<i>Magdalena Tatara</i> , Polaj venkoj kaj malvenkoj en Japanio	15
<i>Teresa Sibilak</i> kaj <i>Irena Solarek</i> , La Tago de Esperanto – reta festo	17
<i>Robert Kamiński</i> , Esperanto floras somere	18
Pri kio ni aŭdas	
<i>Gazetaraj Komunikoj de UEA</i> , “Kontakto” havas novan redaktoron	20
Vizitindaj lokoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Memorinda loko Lubiąż	21
Homoj	
<i>Ulrich Lins</i> , Izrael Lejzerowicz - radikala esperantisto – 3-a parto	23
Lingvosciencia angulo	
Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, <i>Da</i> – nekutimaj uzoj	28
Literaturaĵoj	
<i>Antoni Grabowski</i> , <i>Bożena Różanek</i>	30
Saĝulaj pensoj	
<i>Paŭlo S. Viana</i> , Kapti okazon por edukiĝo	32
Leterkesto	
<i>Mireille Grosjean</i> kaj <i>Ahmad Reza Mamduhi</i> , Nova ILEI-estraro kaj VEKI-2	33
<i>Stefan MacGill</i> , Virtuala IKUE-kongreso	33
<i>Jerzy Dryja</i> , Reta renkonto kun Przemysław Wierzbowski	34
Kalendaro de Esperanto-aranĝoj	34
Diverse, facile, bonguste	
<i>Adam Wilkus</i> , Refreŝiga nutraĵo	36
Oni eldonis	
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , La kanto pri la murdita juda popolo	37
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , Minimuma Esperanta-pola kaj pola-Esperanta vortaro ..	39
Forpasis	
<i>Stanisława Szostak</i>	39

El la fotogalerio de Andrzej Sochacki	
<i>Andrzej Sochacki</i> , 8-aj Esperantaj Tagoj de Staszów 25-29.05.1994	39
Amuze	
<i>Adam Wilkus</i> , Krucenigmo pri mamuloj	43
Zamenhof/Esperanto-Objektoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando – 4	44

Redaktoraj vortoj

Karaj legantoj

Kun la fino de la tria ondo de la pandemio kaj la forigo de iuj el la limigoj, iom reviviĝis la agado de Esperanto. Feliĉe, la mondo malrapide malfermiĝas, kvankam multaj havas dubojn, kaj prave por ke ĝi ne revenu al sia antaŭa stato.

Danke al tio, ni povas denove informi pri interesaj eventoj, rilatantaj al la internacia lingvo en Pollando.

Grava evento por nia pola Esperantujo estis la Ekumena Esperanto-Kongreso en Legnica, dum kiu ne estis limigo rilate al la kvanto de la partprenantoj. Esperantistoj, sopirantaj renkontiĝojn, kun plezuro partoprenis ĉi tiun, tre sukcesan, eventon.

En pli modesta formo ol antaŭe, tamen okazis la muzika festivalo "Pol'land' rock", dum kiu Esperanto estas prezentata de kelkaj jaroj.

Okazis ankaŭ Esperantaj ferioj en Mielno kaj en Łądek-Zdrój. Ni ankaŭ revenas al la Esperanta plaĝo en Sopot. Tradicia renkontiĝo „Esperanto sur strando” revenas kun interesa programo.

Bedaŭrinde, la pandemio denove venkis ARKONES - la sendependa, kultura kaj arta, esperantista festivalo en Poznań. Ĉi tiu evento de jaroj ĉiam allogis esperantistojn tra la tuta mondo. Ĝi estis unika kaj unu el la plej grandskalaj manifestacioj de Esperanto-kulturo. Ĉu ni iam revenos al Arkones?

La lastan kvaronjaron de la nuna jaro markis la datrevenoj de Stanisław Lem kaj Antoni Grabowski. Ni invitas vin al mallonga raporto pri la festo, kiu okazis la 4-an de Julio en Varsovio, okaze de la mortcentjariĝo de Antoni Grabowski, la patro de la Esperanta poezio. La 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Stanisław Lem esperantistoj festis tradukante kaj eldonante lian la plej faman romanon „Solaris”.

Tradicie, parto de la PE-numero estas dediĉita al interesaj lokoj. Ĉi-foje ni invitas vin al la malgranda vilaĝo Lubiąż, 50 km de Wrocław. Ni trovos tie unikan kaj vizitindan postcistercianan monaĥejan komplekson.

Ni jam finas la interesan biografion de Izrael Lejzerowicz, esperante plu labori kun Ulrich Lins, por prezenti liajn sekvajn historiajn artikolojn.

En ĉi tiu numero ni trovos pli da artikoloj kun priskribo de teknikaj kuriozaĵoj. Ne forgesu ankaŭ pri aliaj tekstoj.

Agrablan legadon.

Robert Kamiński

Ĉefa Estraro de PEA

Rezolucio de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio n-ro UZG-001 2021.08.21

Ĉefa Estraro de PEA en sia kunveno la 21-an de aŭgusto 2021, konforme al la PEA-Statuto, §34 punkto 1 kaj punkto 2.1, akceptis rezolucion por kunvoki la Ĝeneralan Kunvenon de la membroj de Pola Esperanto-Asocio la 26-an de septembro 2021.

La Ĝenerala Kunveno okazos en Varsovio, en la sidejo de PEA, ĉe str. Andersa 37/59A, je la horo 11:00 (la unua tempolimo) kaj je la 11:30, (dua tempolimo).

Konforme al la statuto, rajton partopreni la Ĝeneralan Kunvenon havas ĉiuj personoj, kiuj estas ordinaraĵoj membroj de PEA. Laŭ §32 punkto 3, la voĉdonrajto dum la Ĝenerala Kunveno disponeblas nur al tiuj, kiuj estas ordinaraĵoj PEA-membroj, kiuj ne malfruas siajn membrokotizojn, novaj PEA-membroj akceptitaj en 2021, kiuj kontribuis antaŭ la dato de la Ĝenerala Kunveno, kaj honoraj PEA-membroj.

Pro teknikaj kialoj, ni petas la PEA-Filiojn doni al siaj membroj ĉeestantaj la Kunvenon konfirmon pri la pago de kotizoj. Partoprenantoj de la Ĝenerala Kunveno venas proprakoste.

Eventoj

Robert Kamiński

Varsovia omaĝo

La 4-an de julio 2021, je la horo 11:00, en Varsovio, okazis la kunveno, okaze de la 100-a datreveno de la morto de Antoni Grabowski. Al la ceremonio, ĉe la strato Hoża 42, venis esperantistoj el Varsovio, Łódź, Szczecin, Milanówek, Lublin kaj la familio de Antoni Grabowski, kun lia nepo, prof. Zbigniew Antoni Kruszewski, nuntempe loĝanta en Usono, kaj la pranepo Bogusław Grabowski.



Ĉiuj renkontiĝis antaŭ la domo, sur kiu pendas la memortabulo, informanta, ke Antoni Grabowski loĝis en ĉi tiu konstruaĵo. Reprezentantoj de Grabowski-familio kaj aliaj esperantistoj metis florojn ĉe la tabulo. Post la paroloj de ⇐ **Antoni Kruszewski** kaj **Bogusław Grabowski**, ⇓ eksonis Esperanto. Agnieszka Mozer kaj Robert Kamiński legis fragmentojn de Sinjoro Tadeo kaj poezijaĵon de Antoni Grabowski „Saluton al Varsovio”.

Post la komuna foto, parto de gastoj vojaĝis al la tombejo Stare Powązki por meti florbukedon sur la tombo de Grabowski-familio. La ceremonio finiĝis post la komuna renkontiĝo, en la restoracio "Prodiż Warszawski".





Agnieszka kaj Alina Mozer metas florojn ĉe la tabulo Tombo de Grabowski-familio
 Partoprenantoj de la ceremonio ↓



“Multkultura Vilaĝo Esperanto” revenis al la Festivalo Pol’and’Rock 2021



Malgraŭ kronvirusaj obstakloj kaj post la pasintjara paŭzo je la organizado de ĉeesta Festivalo Pol’and’Rock 2020, kiu okazis nur virtuale, la organizantoj tamen kuraĝis organizi malgrandan Festivalon en alia loko – Makowice Płoty, kaj en vere modestaj kondiĉoj, permesitaj de la ŝtataj kuracservoj. Anstataŭ cent-miloj de partoprenantoj - oni permesis inviti nur 20 000 ĉeestajn festivalanojn kaj draste limigis la zonon de kunlaborantaj organizaĵoj kaj firmaoj sur la tereno de la festivala Akademio de Belartoj.

La permeson por labori tie, ni ricevis post longaj interparoloj kaj konvinkado pri vera pliriĉigo de la festivala programo. La fotoj montras, ke nia eduka programo vere

vekis grandan intereson de multaj festivalaj gejunuloj. Sed la plej interesa evento okazis, kiam kelkaj personoj, iamaj lernantoj de Stano Marĉek, dum pasintaj festivaloj - petis lin organizi la apartan grupon de „progresanoj”! Kaj Stano aldonis specialan vesperan lecionon por ili, plialtigante la nivelon de lecionoj!



Radio TOK FM seriozas pri Esperanto

Radio TOK FM ekinteresiĝis pri la temo de Esperanto kaj ĝia kreinto. Mi kredas, ke tio estas la rezulto de publikigo de la 105-a numero de la revuo "Karta" kun vasta (35-paĝa) artikolo, dediĉita al la temo de la internacia lingvo de Ludoviko Zamenhof.

La 26.01.2021 Maciej Zakrocki, en intervjuo kun la direktoro de la Muzeo pri Historio de Polaj Judoj - Polin en Varsovio, priskribas Ludoviko Zamenhof, kiu estis prezentata en la muzeo ekspozicio "Juda Kultura Heredaĵo".

La 8-an de junio 2021 je la 12.00 h, en la 25-minuta programo "Maciej Lizut prezentas", Robert Kamiński interparolis kun la ĉefredaktoro pri Esperanto kaj la Esperanto-movado.

La sekva, ĉi-foje, 50-minuta programo de Małgorzata Wołczyńska kun partopreno de Robert Kamiński estis elsendita la 26-an de julio 2021 ĉirkaŭ 22:00h (kaj ripetita matene sekvonttage) okaze de la Internacia Esperanto-Tago. La ĉefa temo estis, kompreneble, Ludoviko Zamenhof.

Oni devas emfazi la profesiecon kaj grandan scion pri la temo de radio-jurnalisto de TOK FM. La serioza traktado de Esperanto kaj la Esperanto-movado en la amaskomunikiloj tre valoras por ni. Antaŭe oni ofte traktis la temon de Esperanto supraĵe kaj malpeze.

Elsendoj pri Esperanto en Radio TOK FM. troviĝas en podkasto. Por aŭskulti, registriĝu en la retejo de la radio www.tokfm.pl. La registriĝo pagendas, sed la kosto estas malalta. Post ensaluto, enskribu en la serĉilo *Ludwik Zamenhof*.



Robert Kamiński

Reta diskutlisto por poloj denove aperas

Ni revenas al la malnova ideo de la dissendolisto de polaj esperantistoj, kiu estos sekva maniero por komuniki, dividi gravajn informojn kaj diskuti.

Przemysław Wierzbowski kreis grupon ĉe polaj-esperantistoj@googlegroups.com. Por aboni ĉi tiun diskutgrupon, bonvolu sendi retroŝton al polaj-esperantistoj+subscribe@googlegroups.com aŭ - se vi havas Google-konton - aliĝu al la listo, vizitante <https://groups.google.com/g/polaj-esperantistoj>.

Mi kore invitas vin aboni la liston.

Mojose

Pola Esperanto-Junularo

Pri JES kaj kronviroso

Ni, kiel JES-teamo, esperas, ke la tutmonda situacio evoluos tiel, ke dank' al progreso kun vakcinado, fine de 2021, internaciaj vojaĝoj kaj grandaj eventoj denove estos senprobleme realigeblaj. Pro tio, observante la evoluadon, ni daŭrigas la organizadon kaj preparas ĉion kiel kutime.

Tial ni invitas vin aliĝi al JES! Se vi planas partopreni, bonvolu aliĝi! Ni decidis ke, en kazo de malaliĝo antaŭ la fino de septembro, vi povos rericivi la tutan antaŭpagitan sumon. Tio ebligas al vi propran decidon, ĉu vi taksas vian partoprenon sufiĉe sekura por vi.

Informoj pri la aranĝo

Estas afable paroli Esperanton dum la aranĝo (paroli Esperanton ekzemple plifaciligas al aliaj homoj aliĝi al via konversacio), sed ne regas strikta "lingva disciplino" kaj vi rajtas uzi ajnan lingvon, laŭ via plaĉo. Kongrue kun tio vi ne rajtas riproĉi homojn, kiuj ne parolas Esperanton.

Junulara Esperanto-Semajno estas dediĉita por junularo kaj havas riĉan noktan programon. Aliĝante al la aranĝo (<http://jes.pej.pl/eo/>), vi akceptas, ke dum la nokto povas ne esti perfekta silento.



Robert Kamiński

Ĉu vi devenas el Mezopotamio? Ekkonu vian prapatrinon!

Kiel ekkoni vian prapatrinon, kiel ekscii, de kie devenas la prapatroj de via patrino? Surbaze de la DNA, kiu troviĝas en la salivo, sciencistoj de la Universitato de Łódź ekscios, kiu estis via prapatrino – unu el la sep prapatrinoj, de kiuj devenas preskaŭ 95% de la loĝantaro de nia kontinento.

Indas profiti la okazon, lasi sian genetikan materialon en *Biobanko* – la Instituto de la Universitato de Łódź, ĉar, krom scio pri antaŭuloj, ni ankaŭ povas helpi en la kuracado kaj antaŭzorgo pri iuj niaj malsanoj.

Parton de DNA, do genetikan informon, la genetikan kodon, ni heredas nur de patrino. Ĝi nomiĝas mitokondria DNA. Ĉiu havas difinitan specon de DNA - kolekton de DNA-molekuloj, kiuj devenas de unuopa patrino. Dum miloj da jaroj, dum la transdonado de ĝi de generacio al generacio, okazas en ĝi ŝanĝoj.

Tamen, sendepende de la nombro de generacioj, dividantaj nin de la tempo, kiam vivis la virino, kiu la unua havis ĉi tiun specifan specon de DNA, sendepende de ŝanĝoj, kiuj okazis, ĝi estas plue rekonebla kaj, eĉ post dekmiloj da jaroj, oni scias, de kiu ĝi venis. Ekzamenante ĝin, oni povas rekoni nian genetikan linion, kaj la unuan prapatrinon.

De kie povas veni la prapatrino de la pola loĝantaro? Eŭropanoj havas sep praavinojn, de kiuj devenas preskaŭ 95 procentoj de la loĝantoj de nia kontinento. La prapatrinoj ricevis nomojn de la literoj, komenciĝantajn markitajn iliajn DNA-fragmentojn. Ili ricevis la nomojn: Helena, Velda, Tara, Katarzyna, Jasmina, Urszula kaj Xenia. (ekzemple: mtDNA-haplogrupo: J1c2 - prapatrino ricevis la nomon Jasmina). Iuj el ili venis al Eŭropo antaŭ longa tempo, antaŭ 45 000 jaroj (Ursula), alia antaŭ ĉirkaŭ 7 000 jaroj (Jasmina). La virinoj venis de la sudo kaj oriento. Ĉiuj komencis sian vojaĝon tra Eŭropo el la sudo de la kontinento - el la regionoj de hodiaŭaj Grekio, Italio, Hispanio, Sirio, Kartvelio kaj Turkio.

La testado konsistas el sekvencado de DNA kaj daŭras 2-3 semajnojn. De kie akiri DNA por testado? Tio estas simpla - sufiĉas iom da salivo. Ĝia preno estas sendolora kaj sekura. Unu mililitro da salivo devas esti lasita en speciala specimenujo, ekipita per buŝaĵo.

Per tia esplorado la *Biobanko* volas informi la loĝantojn de Lodzo pri agado de la scienca instituto en la urbo, kiu okupiĝas pri studado de genetika materialo. Kvankam la ĉefa celo de la instituto ne estas rekoni, kiu estis la prapatrino de la donanto de genetika materialo.

La *Biobanko de la Universitato de Łódź* uzas biologian materialon, kolektitan de volontuloj, por esplorado pri la kaŭzoj kaj metodoj de antaŭzorgo kaj kuracado de civilizaj kaj maloftaj malsanoj. Venontaj generacioj estos pli vundeblaj, kaj ĉi tio donas la ŝancon por pli frua reago, prevento, serĉado de manieroj, kiel trakti malsanojn. Tamen, oni povas atingi ĉi tiun celon, nur se ni havas sufiĉe da biologia materialo, havebla por esplorado.

La *Biobanko* invitas ĉiujn kunlabori kaj donaci salivajn specimenojn. Ĉiuj tiuj, kiuj decidis fari tion, estos petitaj subskribi konsentan formularon por genetika saliva testado kaj pospondi etan demandaron.

Laboratorio de la *Biobanko* funkcias ĉe la Fakultato pri Molekula Biofiziko ĉe la Universitato de Łódź, kaj estas unu el la malmultaj similaj institucioj en Pollando, kiuj kolektas kaj testas specimenojn de biologia materialo en la formo de salivo, sango kaj DNA. La rezultoj de la laboroj, faritaj en biobankoj, helpas kompreni la genetikajn kaŭzojn de civilizaj malsanoj, rarajn malsanojn kaj neoplasmojn. Kaj, danke al ili, vi ankaŭ povas identigi viajn prapatrojn en la ina linio.



Ni savu la abelojn

Antaŭ pli ol 10 jaroj mi partoprenis en la seminario, kies temo estis „Ni savu la abelojn”. Bedaŭrinde, tiam ne entute mi konsentis kun la ĉefa ideo de la seminario, ke sen abeloj la mondo ne ekzistas, ke ili estas la plej gravaj insektoj sur nia planedo, kaj ke kiam malaperos la lasta abelo, la vivo sur la tero ne daŭros eĉ 10 jarojn...

Hodiaŭ, mi konsentas kun la konstato, kiu estas atribuita al Albert Einstein, ke “se malaperos la lasta abelo sur la terglobo, al la homaro restos nur 4 jarojn por vivi”. Kial? Ĉar por tiu tempo estos por ni provizo de nutraĵo.

Jan, nia konata abelisto, de kiu de longa tempo mia familio aĉetas mielon, substrekas, ke sen abeloj ne estas rikoltaĵo, kaj ke oni devas savi tiujn neordinare utilajn insektojn. De li mi eksciis, ke por produkti ĉ. duonlitron da mielo, abeloj devas viziti ĉ. 2 500 000 florojn! Unu abelo dum tuta sia vivo produktas unu kuleron da mielo! Tio estas murda fortostreĉo, ĉu ne? Ĉu ni tion aprezas?

La abeloj estas do tre grava ligilo en la naturo, ili estas tre al ni bezonataj. Ne temas nur pri mielo, ĉar sen ĝi ni travivos. Al la abeloj, la solaj el la plej laboremaj insektoj, ni ŝuldas dankon pro 75% de la monda produkto de nutraĵo. La abeloj estas respondecaj pri poleno de plantoj



mangĝeblaj por ni. Mangante legomojn, fruktojn, akvumante florojn, aŭ preparante paŝtaĵon por bestoj, ni pensu pri abeloj. Sen ili multaj fundamentaj produktoj ne troviĝus sur niaj teleroj.

Ekstermo de la abeloj estas por la mondo ege ekologia kataklismo, estas malsato! La abel-kolektivoj draste malgrandiĝas. Kio estas kaŭzo, ke la abelaj familioj amase forapereas? Kaŭzoj estas multaj. Unu el ili estas naturaj malsanoj, kiuj aperas en naturo, sed signife pli danĝera estas nerespondeca procedo de homoj.

Klimatŝanĝoj, kiujn elvokas nia agado, malfortigas organismon de abeloj, paralizas ilian naturan ciklon. La vintroj estas pli varmaj kaj la

someroj pli malvarmaj. Estas do malpli floroj kaj ilia nektaro estas sola fonto de nutraĵo de abeloj.

Uzado de toksaj sterkoj, estas danĝeraj por abeloj, sed ne por herbaĉoj. En la mondo estas spacoj sen abeloj, kie homoj devas mem poleni florojn per penikoj. Ĉu ili povas fari tion same, kiel abeloj? Kompreneble, ke ne.

La abeloj forpereas, precipe en tiuj lokoj, kie estas kultivata amasa terkulturado, do homogenaj specoj. Tiam la abeloj kolektas nektaron nur el unu planto kaj por la abeloj tio estas nenatura stato. Ili devas poleni diversajn florojn kaj kolekti nektaron el diversaj plantoj.

Teknologio en ĉiutaga vivo devas helpi kaj ne malutili. Bedaŭrinde, ni ofte elvokas t.n. elektrosmogon, kiu negative influas al la abeloj. Tio malfaciligas al ili trovadon de floroj kaj revenon al la abelujo.

Ekzistas multaj rimedoj por savi abelojn, tiujn plej laboremajn kaj plej bezonatajn insektojn en la mondo. Antaŭ ĉio oni devas kompreni, ke tiuj, neordinaraj insektoj estas viktimoj de la hom-agado, malgraŭ tio, ke ili faras por li/ŝi tiom multe da bono. Ĉiu el ni, povas fari kontribuaĵon por savi abelfamilion. Sufiĉas en la ĝardeno, aŭ en kesteto, sur fenestrobreto, planti naturajn, nemodifatajn florojn aŭ kuracherbojn. Inter ili valoras enmeti bovleton kun akvo, ĉar la abeloj bezonas akvon.

Danke al iniciato de Slovenio, Unuiĝintaj Nacioj rezoluciis Mondan Tagon de Abeloj, kiun ni festas la 20-an de majo. Tiu tago estas la naskiĝtago de Anton Janša (20.05.1734–13.09.1773), la slovena abelisto kaj pentristo, pioniro de la moderna abelkulturado.

Robert Kamiński

Kiu aŭtomobilo estis la plej multekosta en la historio?

Kiam ni pensas pri ĉi tiu demando, ni kutime pensas pri aŭtoj Rollls Rolce aŭ aŭtoj de arabaj ŝejkaj, kun karoserio el arĝento kaj interno, ornamita per grandvaloraj gemoj. Tamen, ne tiuj veturiloj kostis plej multe. Oni konstruis nur kvar kaj tri el ili staras senaktive post veturado de kelkdek kilometroj, kaj la kvara estas en muzeo.

Nun ni prezentu nian misteran veturilon. Ĝi estas Lunar Roving Vehicle (LRV) - kvarrada veturilo, uzita dum kosmaj misioj Apollo 15, 16 kaj 17, por vojaĝi sur la luna surfaco. Ĝi estis uzata por transporti ilojn, sciencajn kaj komunikajn ekipaĵojn, kaj lunajn, grundajn specimenojn. Ĝi estis uzata dum la tri lastaj lunaj flugoj de la programo Apollo.



La "luna aŭtomobilo" estis unu el la plej multekostaj en la historio. Tri LRV restas ankoraŭ sur nia satelito. Ili ne laboris tro peze. Tri veturiloj vetuis sume 70,5 km dum 10,5 h. La veturilo povis atingi la rapidecon 13 km/h, kvankam fakte sur la luno oni veturis meze 9 km/h kaj maksimuma longeco de la vojo de LRV estis 7,6 km. Ĝi ne havis la stirradon de la teraj aŭtoj, sed gvidilon, kiel en aviadiloj. Pro la manko de oksigeno, ĝi ne havis benzenan brulmotoron, sed kvar elektrajn motorojn, provizeblajn per ĥemiaj baterioj, po unu ĉiurade. Ĝi povis vojaĝi maksimume 100 km. Eta kuriozaĵo: tiu "bolido" havis licenclaton! Sur tiu de la misio Apollo 15 oni povis legi "Moon LRV 001 1971". Tamen la utilon de tiu licenclato mi ne komprenas, ĉar, laŭ mia scio, estas neniu policisto tie, surlune, kiu povus haltigi kaj monpuni kulpan ŝoforon.

La LRV-on, konstruis la kompanio Boeing Company, laŭ kontrakto kun General Motors. Unu el la ĉefaj projektantoj estis Mieczysław Bekker, poldevena inĝeniero, laboranta en Usono. La veturilo estis transdonita al la spaca agentejo NASA la 14-an de marto 1971, du semajnojn antaŭ la planita dato kaj dek sep monatoj post la subskribo de la kontrakto.



Komence, la konstruado de la LRV estis taksita je 19 milionoj USD. Finfine, ĝi leviĝis ĝis 38 milionoj. Ĝustigita por inflacio, tradukita al la aktuala valoro de la usona valuto, ĝi estas sumo egala al 222,4 milionoj. Ĉu sekvonta vojaĝo al nia satelito kaŭzos ankoraŭ pli multekostan konstruadon de veturilo? 😊

Robert Kamiński

Unua elektra aviadilo en Eŭropo

Plibonigoj en la konstruado de baterioj ĝis nun ankoraŭ ne donas esperon, ke elektraj aviadiloj tre populariĝos en niaj flughavenoj. Pli aŭ malpli frue ili tamen devos disvastiĝi - la transporta sektoro havas grandan problemon, kunligitan kun ekologio. Tial estas agrable aŭdi, ke estas firmaoj en la mondo, kiuj volas disvolvi alternativajn konceptojn en la transporto, kiu estas unu el la plej grandaj mondscale „toksig-antoj”.



Velis Electro estas la unua elektra aviadilo, atestita de la Eŭropa Unia Aviada Sekureca Agentejo (EASA), do ĝi povas esti normale kaj laŭleĝe funkciigita en Eŭropo. La e-aviadilo baziĝas sur la modelo Virus SW 121, de kiu ankaŭ devenas la pli malnova Pipistrel Alpha Electro.

Velis Electro uzas motoron kun maksimuma potenco de 57,6 kW/78 ĈP (ĉevalpovo) kaj kontinua potenco de 49,2 kW/67 ĈP. Ĝi enhavas du paralel-konektitajn, likvomalvarmigatajn bateriojn kun kapacito de 11 kWh ĉiu - unu estas en la fronta parto, la alia antaŭ la vosto de la aviadilo. Ili permesas resti en la aero dum 50 minutoj, kompreneble, ili ankaŭ havas energian rezervon por krizaj situacioj.



La Elektra Pipistrel Velis gastigas piloton kaj unu pasaĝeron, ĝia totala utila ŝarĝo estas 172 kilogramoj, maksimuma flugalteco - 3,66 kilometroj, la kroza rapideco - ĉirkaŭ 170 km/h. Ĝi estas uzota por trejnado. Laŭ la deklaro de la fabrikanto, la bruo, kiun ĝi generas, estas 60 dB. La unuaj testflugoj okazis en la jaro 2018, en Aŭstralio, Norvegio kaj Finnlando. La atestada procezo daŭris malpli ol tri jarojn.

Indas rimarki, ke propulsa bloko de la aviadilo ricevis apartan aprobon, markitan per la simbolo E-811-268MVLC. La fabrikanto pretas disponigi ĝin al aliaj kompanioj, do la maŝinoj, konstruitaj danke al la bloko, preterpasos la atestatan proceduron pli rapide. La slovena kompanio malkaŝis, ke antaŭ la fino de la jaro 31 veturiloj Velis Electro estos liveritaj al klientoj en 7 landoj. Dek du ekzemplerojn mendis la svisa kompanio AlpinAirPlanes.

Malgraŭ ankoraŭ ne perfektaj baterioj, oni jam povas konstrui uzablajn, elektrajn, aviadilojn.



Magdalena Tatara

Polaj venkoj kaj malvenkoj en Japanio.

La 32-aj Someraj Olimpiaj Ludoj okazis de la 23-a de julio ĝis la 8-a de aŭgusto 2021 en Tokio - la ĉefurbo de Japanio. Kaŭze de la pandemio de KOVIM-19, la evento estis postdatigita je unu jaro, sed ĝia nomo restis neŝanĝita - Tokio 2020 - por merkataj kaj markaj celoj. Pro la pandemio, ĉiuj sportaj eventoj okazis sen partopreno de publiko.



Polaj sportistoj gajnis 14 medalojn - 4 orajn, 4 arĝentajn kaj 6 bronzajn kaj tio estas la plej bona atingo en Olimpikoj en la 21-a jarcento.

Logotipo de la Olimpikoj

Naŭ medalojn ricevis reprezentantoj de atletiko kaj tiu nombro estis la plej alta en la historio. Atletoj gajnis kvar orajn medalojn - du en martelĵetoj virina kaj vira - Anita Włodarczyk kaj Wojciech Nowicki. Por Anita tio estas jam tria olimpika oro. Antaŭe ŝi venkis en Londono, en 2012 kaj en Rio de

Ĵaneiro, en 2016. Oran meladon poloj venkis en miksa (po du virinoj kaj viroj) stafetkuro 4x400 metroj - unuafoje ludita konkurso dum Olimpikoj. En la pola teamo kuris Karol Zalewski, Natalia Kaczmarek, Justyna Święty-Ersetic kaj Kajetan Duszyński, kiuj atingis ankaŭ olimpikan kaj eŭropan rekordojn. Al la sukceso kontribuis ankaŭ Dariusz Kowaluk, Iga Baumgart-Witan kaj Małgorzata Hołub-Kowalik, kiuj partoprenis en duonfinala kuro. La plej neatenditan oran medalon gajnis Dawid Tomala, en 50-kilometra marŝo, la sportisto, kiu tute ne estis konata antaŭ la Olimpikoj. La arĝentajn medalojn gajnis Maria Andrejczyk, en virina lancoĵeto, kaj Natalia Kaczmarek, Iga Baumgart-Witan, Małgorzata Hołub-Kowalik kaj Justyna Święty-Ersetic, en virina stafetkuro 4x400 metroj. Du martelĵetistoj gajnis bronzaĵajn medalojn: Malwina Kopron kaj Paweł Fajdek. Neatendite Patryk Dobek gajnis la bronzaĵan medalon, en 800-metra kuro.

En aliaj sportoj ne estis tiel optimisme. Kvar sekvaj medaloj estis atingitaj en akvaj sportoj. La arĝenton gajnis Agnieszka Skrzypulec kaj Jolanta Ogar-Hill, en velado en la klaso 470. Karolina Naja kaj Anna Puławska ankaŭ gajnis arĝenton, en kajakregato en 500 metroj. Karolina Naja, Anna Puławska, Justyna Iskrzycka kaj Helena Wiśniewska atingis la bronzaĵon, en kajaka kvaropo en 500 metroj. La unua medalo por Pollando estis arĝento, kiun gajnis virina kvaropo, en remado: Agnieszka Kobus-Zawojska, Marta Wieliczko, Maria Sajdak kaj Katarzyna Zillmann.

La bronzaĵon ĝuis luktisto Tadeusz Michalik, batalante laŭ la klasika stilo, en la kategorio 97 kilogramoj.

Bedaŭrinde, estis ankaŭ seniluziigoj kaj la plej grandan faris polaj flugpilkistoj - mondaĵ ĉampionoj, kiuj malvenkis kvaronfinalan matĉon kontraŭ la teamo de Francio kaj perdis la ŝancon gajni medalon.



Venkintoj de la miksa stafetkuro: ekde maldekstro - Natalia Kaczmarek, Karol Zalewski, Kajetan Duszyński kaj Justyna Święty-Ersetic dekstre Anita Włodarczyk





Wojciech Nowicki



Dawid Tomala

Teresa Sibilak kaj Irena Solarek

La Tago de Esperanto – reta festo


Kiel kutime, ĉiujare la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado solene festis la naskiĝtagon de la lingvo Esperanto. Ĉi-jare ni festis jam 134 jarojn de la internacia lingvo. Pro la pandemia tempo ni festis rete, komferte sidante hejme kun kafo kaj kuko.

Ĉiujn salutis Małgosia Komarnicka, la instruistino de la E-kurso. Ŝi prelegis pri la historio de Esperanto kaj E-movado. Ni ankaŭ aŭskultis kelkajn E-kantojn, kiuj estis premiitaj en la pasintjara Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Poste ni aŭskultis intervjuon, kiun faris la ĵurnalisto de la fama loka radio *Radio Rodzina* kun Małgosia. Ŝi respondis demandojn, sed ankaŭ interpretis respondojn de invititaj esperantistoj el diversaj landoj: el Francio, Brazilo, Kongo kaj Ukrainio. Eksterlandaj gastoj respondis la demandon: Kial Esperanto? Ni do eksciis, ke Esperanto estas la internacia lingvo de amikeco, ke ĝi estas simpla kaj facila kaj ĉiu povas lerni kaj uzi ĝin eksterlande kaj ke la mondo bezonas neŭtralan lingvon.

Fine de la festa tago Małgosia petis, ke nun ni respondu la demandon: Kial Esperanto? Ni ĉiuj, unue ripetis tion, kion jam diris esperantistoj dum la radia intervjuo. Tamen poste ni aldonis, ke ni ŝatas lerni Esperanton, ĉar danke al ĝi ni renkontis multajn mirindajn homojn el la tuta mondo kaj ekkonis ilian kulturon. Danke al Esperanto ni partoprenis en la 1-a

Esperanto-turneo “Diversaj nacioj kaj kulturoj, sed nur unu komuna lingvo - Esperanto” kaj en la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Ni konvinkiĝis, ke sufiĉas scii Esperanton por facile komunikiĝi kun homoj el diversaj landoj sen scii ilian lingvon.



Dum nia lernado ni ofte havas eblecon interparoli kun esperantistoj el aliaj landoj. La plej ofte nin vizitas Svetlana Pogorelaja el Ukrainio kaj kun ŝi ni vizitas Kijevon, kie ŝi loĝas. Laste ni “rete flugis” al Ĉinio, danke al Liu Jianguo, por viziti Hefejon, la ĉefurbon de la provinco Anhujo. Tiuj renkontiĝoj estas tre agrablaj kaj instigaj por lerni la lingvon Esperanto Vivu Esperanto! Vivu la 26-a julio – la Tago de Esperanto!

<https://www.radiorodzina.pl/audycje/swiatowy-dzien-esperanta/>

Robert Kamiński

Esperanto floras somere


La 15-a de oktobro estas en Eŭropo la plej bona tempo por meti bulbojn de tulipoj en teron. Plantu jam hodiaŭ la tulipon Esperanto, por ke ĝi bele ekfloru en via ĝardeno dum la printempo 2022. Preskaŭ ĉiuj esperantistoj scias kaj fieras, ke ekzistas la tulipo kun la nomo Esperanto.

Temas pri la tulipo Esperanto (*Tulipa gesneriana* "Esperanto"), kiun proponas la nederlanda firmao Bakker. "Esperanto" estas ruĝakolora kaj havas la verdan strion sur petaloj. La floro ricevis la nomon Esperanto en 1994.

En la jaro 1968 esperantisto J. Pranger en Nederlando malkovris mutacion de la jam ekzistanta tulipo, nomata "Hollywood". En 1977 ĝi estis plantita en eksperimenta ĝardeno de la Reĝa Ĝenerala Asocio por Florbulbokulturo. Tiam la floro estis kronita per atesto de la eksperimenta ĝardeno kaj en 1979 ĝi ricevis la ateston de nova specio. La floro estas akceptita en la komerckolekton de la konata kulturejo kaj komerca firmao Frans Roozrjen en Vogelenzang. Ĝi troviĝas ankaŭ en Keukenhof - la plej granda ĝardeno en Nederlando kun diversaj bulbfloroj. La bulboj estas facile aĉeteblaj ĉe la populara interreta butiko Allegro.pl.


Ne ĉiuj scias, ke ekzistas ankaŭ alia planto kun la nomo Esperanto. Ĝia botanika nomo estas *Clematis grandiflora* "Esperanto". Grandflora klematito „Esperanto”, estas folia, plurjara grimpoplanto kun pinataj, malhelverdaj folioj. La klematito de la frua somero ĝis la frua aŭtuno, havas grandajn, rozkolorajn ĝis purpur-rozkolorajn florojn kun pli malhelaj centraj zonoj. *Klematito „Esperanto”* atingas altecon de 2m kaj disvastiĝon de 1m post 2-5 jaroj. La planto estis kultivita de la estona ĝardenisto Uno Kivistik kaj lia edzino Aili en 1982. Uno kaj Aili Kivistik kreskigis klematitojn en la familia bieno Roogoja en Estonio dum la periodo 1979 ĝis 1996. Dum tiu tempo ili kreskigis preskaŭ 150 ĝiajn speciojn. La planto travivas la severajn estonajn vintrojn kaj sukcesas maturiĝi dum relative mallonga somero. *Klematito Esperanto* kreskas kaj floras en Esperanto-urbo Herzberg am Harz.

Mi provis aĉeti ĝin en Pollando, sed sensukcese. Tamen, mi trovis estonan retvendejon (nur en la estona lingvo), kiu vendas la klematiton. Espereble tiu, kiu konas la estonan, povas helpi ĉe la aĉetado <http://myshoproller.com/roogoja-1/et/a/esperanto>.



(Rigardu kolorajn fotojn sur kovrilo)

“Kontakto” havas novan redaktoron



En 2021 TEJO faris alvokon por nova redaktoro de la revuo Kontakto, ĉar post dek jaroj la ĝisnuna redaktoro Rogener Pavinski mem decidis fini sian longan altkvalitan deĵoradon en la posteno. De la alvoko venis tri kandidatigoj, de tri sufiĉe interesaj kandidatoj, kaj post tri intervjuoj kaj diskutado la Estraro de TEJO decidis akcepti Paweł Fischer-Kotowski kiel la novan redaktoron de Kontakto.

TEJO kaj UEA gratulas al Paweł pro la elekto kaj kore dankas al Rogener pro lia longdaŭra kontribuo kaj malavara decido doni lokon al novaj fortoj.

Ni informas, ke ankaŭ mankas grafikisto por kunlabori kun Paweł, kaj por tiu posteno TEJO devos tre baldaŭ sendi sekvan alvokon.

Se vi volas subteni la laboron de Kontakto, konsideru ĝin aboni papere aŭ elektronike (ekde nur 6 EUR: uea.org/alighoj/abonilo) aŭ fariĝu individua membro aŭ patrono de TEJO (uea.org/alighoj/alighilo). UEA kuraĝigas la komunumon montri sian subtenon al Kontakto, al TEJO, al Rogener kaj al Paweł.

Pola Esperanto-Asocio gratulas al **Paweł Fischer-Kotowski** kaj deziras al nova redaktoro kaj redakcia teamo sukcesojn kaj bonan laboron.



Ĉiu Gazetara Komunikado de UEA estas libere uzebla laŭ la Permesilo CC BY 4.0.

Robert Kamiński



Memorinda loko Lubiąż

Inter multaj vizitindaj lokoj en Malsupra Silezio precipe interesa loko estas Lubiąż apud Legnica. En la vilaĝo troviĝas grandega monaĥeja komplekso el la 17-a jarcento parte ruinigita dum kaj post la Dua Mondmilito.

La komplekso konsistas el baziliko de la Ĉielenpreto de la Plej Sankta Virgulino Maria de la jaroj 1307-1340 (konstruita sur la restaĵoj de la samnoma romanika preĝejo el la 12-a jarcento), el la Monaĥejo kaj Abata Palaco el la 17-a kaj 18-a jarcentoj, helpa preĝejo al sankta Jakobo kaj mastrumejaj konstruaĵoj.

La cisterciana, monaĥeja komplekso en Lubiąż (nomata ĉefverko de la silezia baroko) estas dua la plej granda sankteja objekto en la mondo (la unua estas la Eskurial-palaco kaj monaĥeja komplekso en Hispanio). Samtempe ĝi estas la plej granda cisterciana abatejo en la mondo. La surfaco de ĝia tegmento havas ĉirkaŭ 2,5 hektarojn kaj 223 metrojn longa fasado estas la plej longa baroka fasado en Eŭropo. Ĝi havas pli ol 600 fenestrojn.

En la kriptoj sub la gotika baziliko estas tomboŝtonoj de regantoj el la Silezia Piast-dinastio, inkluzive de Boleslavo la Alta, kaj mumioj de cistercianaj abatoj kaj monaĥoj. Ĝis nun tie restis 98 mumioj.

Kaj nun de la jaro 1989 la objekto estas rekonstruata kaj po parte disponigata al la publiko kaj adaptigata por novaj funkcioj. La laboroj daŭras ĉefe danke al la penado de la *Fondaĵo Lubiąż* el Wrocław.

Ekde la jaro 1996 oni povas viziti en la Abata Palaco la imponan Princan Salonon, kiu havas pli ol 400 m² kaj altecon de 13,4 metroj. La salono, kiu okupas du etaĝojn de la konstruaĵo, ornamas multaj skulptaĵoj de la majstro el Wrocław - Józef Mangoldt.

La imponan aspekton de la interno pligradigas pentrita plafono kaj murpentraĵojn de la pentristo Christian Bentum. Ĉi tiu salonego estas konsiderata kiel unu el la plej elstaraj monumentoj de la silezia baroko. En ĝi okazadas diversaj muzikaj koncertoj.

En sekvaj jaroj oni renovigis ankaŭ aliajn salonojn kaj nun estas disponeblaj por vizitantoj la abata refektorio kaj la somera refektorio. En septembro 2009 okazis rekonstruaj laboroj en la lasta granda reprezenta halo de la palaco - la abata biblioteko. La eksa preĝejo de la Virgulino Maria ankaŭ estis disponebla, bedaŭrinde sen ekipaĵo. La tuta komplekso viziteblas ĉiun jaron la duan semajnfino de majo, dum la aranĝo „Nokto de Muzeoj”.



Ekde la jaro 1998 la *Fondaĵo Lubiąż* kune kun la Arta Agentejo „Jedynka” el Wrocław organizas ciklajn eventojn nomatajn „Korso Pałacowe” (Palaca Promenado), dum kiuj oni povas viziti kaj rigardi ĉiutage fermitajn ĉambrojn, monaĥejajn subtegmentejoj, mansardojn kaj aliajn interesaĵojn post la restaŭrado.

En la abatejo ekde la jaro 2001 okazas, la Festivalo SLOT kaj ekde la jaro 2005 la festivalo de la elektronika muziko „Electrocity”. (SLOT-Artfestivalo - estas pollingva mallongigo de la Asocio de Lokaj Kreo-Centroj.)

Dum pluraj jaroj, danke al la kunlaboro de la Fondaĵo Lubiąż kun la Muzeo „Haus Schlesien” (Silezia Domo) en Königswinter en Germanio, la abatejo gastigas ekspoziciojn dediĉitajn al la historio, kulturo kaj diversaj formoj de la vivo en Silezio.

Mi vere rekomendas viziti postcistercianan komplekson en Lubiąż kaj per sia vizito helpi al la rekonstruado de tiu valora objekto.

Homoj

Ulrich Lins, “Beletra Almanako” n-ro 38

Izrael Lejzerowicz - radikala esperantisto – la 3-a parto



Proksimiĝis la 29-a UK, kiu estis okazonta en Varsovio en 1937, kvindek jarojn post la estiĝo de Esperanto. Tiu kongreso “elektrizis” Lejzerowicz, ĉar li atendis, ke ĝi krom esti okazo por feste jubilei inspiros al la Esperanto-movado novan memfidon kaj kuraĝon. La esperoj nur parte plenumiĝis. La riĉa kongresa programo, kiu inkluzivis ekskurson al Bjalistoko (la “Esperanto-Betlehem”, kiel foje Lejzerowicz ĝin nomis¹), kontentigis la plimulton de la mil partoprenantoj. Sed la skismo en la internacia movado ne povis esti riparita; paralele ekzistis du mond-organizaĵoj, Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Ligo. Pli malbone, malfavoraj eksteraj cirkonstancoj ĵetis ombbron super la Jubilean Kongreson. Jam antaŭ ĝi parto de la gazetaro atakis la polan registaron pro tio, ke ĝi konsentis pri la

okazigo de “judkomunista” kongreso. Dum la kongresa semajno mem tiuj gazetoj, ekstreme dekstraj aŭ faŝismaj, presis absurdajn kalumniojn pri la Esperanto-

¹ I. Lejzerowicz, “Profeto en sia urbeto”, *Pola Esperantisto* 23. 1929, n-ro 12, pp. 160-161 (cit. p. 161).

movado. Kiel Lejzerowicz priskribis en artikolo aperinta en *Literatura Mondo*², ili per “cinike senhontaj atakoj” kreis tiel preman atmosferon, “ke la kongresanaro, almenaŭ granda ĝia parto sentis sin kvazaŭ terorita”. Li ankaŭ amare raportis, ke projekton de rezolucio, kiu vokas al batalo kontraŭ rasa malamo, dum la Kongreso sukcese faligis la timemaj “neŭtraluloj”.

Du jarojn poste eksplodis la Dua Mondmilito, kies unua viktimo estis Pollando. Nelonge antaŭ ol Lodzo estis okupita de germanaj trupoj, Lejzerowicz fuĝis el sia hejmurbo. Lia celo estis Varsovio. Sed survoje li estis kaptita kaj metita en koncentrejon apud Krakovo. Post kelkaj monatoj li liberiĝis kaj fine tamen atingis Varsovion. Komenciĝis por Lejzerowicz same kiel por centmiloj da judoj la vivo, terura vivo, en Varsovio, en la Varsovia geto. Pri la suferoj de tiuj judoj, pri la malsato, persekutado kaj ekstermado ni havas multe da raportoj kaj atestoj, kaj tial eĉ sen la ekzisto de materialo rekte rilatanta al Lejzerowicz ni povas imagi, en kiuj suferigaj kondiĉoj li kaj lia familio troviĝis. Ni tamen scias, ke li klopodis zorgi pri Esperanto eĉ en la geta teruro. Isaj Dratwer (1905-1985), unu el la malmultaj judaj esperantistoj en Pollando, kiuj transvivis la nazian okupadon, post la milito raportis, ke en la geto okazis konspira Zamenhof-festeto kaj ke la parolado, kiun tie faris Izrael Lejzerowicz, “kiel kutime, estis impresa, profundsenta, malgraŭ ĉio li kredis la triumfon de Homo, ke venkos la historia justeco”³. Dratwer ankaŭ sciigis, ke Lejzerowicz en la geto komencis traduki en Esperanton la versan eposon *Konrad Wallenrod* de Adam Mickiewicz⁴, kaj ke jidlingve li verkis romanon kun supozeble aŭtobiografiaj trajtoj.

Nenio postrestis el tiu literatura aktivado de Lejzerowicz en la Varsovia geto. Sed ja konserviĝis skribaĵoj, kiuj estas liaj lastaj vivsignoj. Antaŭ pluraj jaroj mi foje grimpis al la subtegmentejo de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, kiun kutime eĉ la oficistoj ne eniris. Interesis min tie arkivaĵoj el la Ĝeneva tempo de UEA. Mi foliumis jen en tiu, jen en alia polvokovrita dokumentujo. Tiam altiris mian atenton dosiero pri la helpagado de UEA dum la Dua Mondmilito. Oni scias, ke Hans Jakob (1891-1967), la direktoro de UEA en Ĝenevo, provis kaj iom sukcesis fruktuzi la pozicion de neŭtrala Svislando por helpi esperantistojn en la nazie okupitaj landoj. Kadre de tiu “Esperantista Interhelpo” li ekzemple sendis pakaĵojn al la familianoj Zamenhof vivantaj en la Varsovia geto.

En tiu dosiero mi trovis ses poŝtkartojn de Izrael Lejzerowicz. Ili estas skribitaj en la jaro 1941 kaj adresitaj al Hans Jakob en Ĝenevo. Ili portas la adreson “Warschau, Wielka 19/9” kaj estas ĉiuj verkitaj, pro la cenzuro, en la germana lingvo.

² Georgo Verda, “La Jubilea”, *Literatura Mondo* II, 7. 1937, n-ro 4, pp. 97-100.

³ Isaj Dratwer, “Izrael Lejzerowicz. Georgo Verda”, *Literatura Mondo* III, 1. 1947, n-ro 5/6, p. 86.

⁴ Sed fragmento aperis jam en *Junula Voĉo*, 1921, n-ro 1.

(Sian nomon li tie skribas “Lajzerowicz”.) La unua poŝtkarto estas de la 12-a de marto 1941. En ĝi Lejzerowicz asertas, ke li kaj lia familio estas sanaj, demandas pri la farto de samideanoj Braga, Querin kaj Parrish⁵ kaj aparte interesiĝas pri Akiwa Gerszater, gvida juda esperantisto en Vilno.⁶

Lejzerowicz tre ĝentile petas, ke Jakob” transdonu al kelkaj amikoj mian peton bonvole sendi al mi, se eble, pakaĵojn”. Jakob – en sia satiro *Verda Biblio* Lejzerowicz milde mokas pri la „patriarko Jakob”, kiu vekas en la verda popolo pecon kaj oferemon” – tuj respondis (24-3-1941), kaj Lejzerowicz sciigas al li en nova poŝtkarto, la 16-an de aprilo, ke „la fakto, ke vi volas por mi laŭeble ion fari, simple feliĉigis min”, kvankan la anoncita pakaĵo ankoraŭ ne venis. Kvazaŭ flanke Lejzerowicz petas al Jakob: „Eble vi povos klopodi pri la ŝanco de elmigro al Sudameriko, eventuale Nordameriko, Kubo ktp”.^{7 8}

Du monatojn poste, laŭ la tria poŝtkarto de Lejzerowicz, de la 21-a de junio, la pakaĵo plue ne alvenis. Li dankas pro letero de Jakob de la 22-a de majo kaj raportas, ke lia edzino estis dufoje operaciita, sed nun fartas pli bone. Eksciinte pri la morto de Vilmos Bleier (1903-1940), la eldoninto de *Literatura Mondo*, Lejzerowicz demandas al Jakob, kiel fartas Baghy kaj Kalocsay, al kiu lasta li skribis antaŭ unu jaro, “sed ne ricevis respondon”. Li petas krome: “Kara Jakob, ne forgesu ankaŭ pri Lidia [Zamenhof]. Faru por ŝi ĉion, kio eblas.”⁹

De tiam poŝtaĵoj de Jakob ne plu atingis Lejzerowicz. La 5-an de aŭgusto li precizigas, ke li bezonas precipe pakaĵojn kun vestaĵoj (“malnovaj, sed porteblaj”). La 18-an de septembro li danke konfirmas la ricevon de “kelkaj pakaĵetoj” senditaj de la ĉefdelegito de UEA en Portugalio Manuel de Freitas (1910-1996) laŭ perado de Jakob.

⁵ 28 Temas verŝajne pri la brazilano Ismail Gomes Braga (1891-1969), la argentinano Salvador Querin kaj la usonano Donald E. Parrish (1889-1969).

⁶ 29 Kion Lejzerowicz neniam povis ekscii: Akiwa Gerszater travivis en Vilno unue la sovetian okupacion de Litovio, poste la alvenon de germanaj trupoj. Fine de 1943 lin minacis transporto en geton kaj baldaŭa mortigo, sed la litova esperantisto Antanas Poška (1903-1992) dum preskaŭ dek monatoj kaŝis kaj nutris lin en sia hejmo. Gerszater mortis en Israelo en 1964.

⁷ En la sama poŝtkarto Lejzerowicz raportas, ke “fraŭlino Br. [=Bronisława] Aronowicz”, kiun ŝajne Jakob bone konis, pro malsano mortis komence de aprilo.

⁸ En la sama poŝtkarto Lejzerowicz raportas, ke “fraŭlino Br. [=Bronisława] Aronowicz”, kiun ŝajne Jakob bone konis, pro malsano mortis komence de aprilo.

⁹ La 25-an de junio 1941 Lidia dankis al Jakob pro la ricevo de du pakaĵetoj “el Porto”, t.e.

de Manuel de Freitas: *Esperanto* 37. 1941, n-ro 489, p. 22.

La lasta konservita poŝtkarto estas de la 19-a de novembro 1941. Ĝi estas kun peno kaŝita helpokrio. Lejzerowicz informas, ke li havas parencojn en Usono, Brazilo kaj Parizo, sed perdis iliajn adresojn. Li petas, ke Jakob helpu de tiuj parencoj kaj de amikoj sendigu al li pliajn pakaĵojn¹⁰. Kaj li ripetas ankaŭ sian peton pensi pri Lidia, kiu “estas nun tute sola kun sia fratino [Zofia]”. Li sciigas, ke ŝia onklino Helena forpasis¹¹.



Tiutempe komenciĝis la sistema mortigado de judoj. La plej multaj historiistoj supozas, ke plej malfrue meze de decembro 1941, do proksimume unu monaton post tiu lasta vivsigno de Lejzerowicz, Hitler definitive komprenigis al siaj subuloj, ke ĉiuj judoj estu mortigitaj. La deportado de judoj el la Varsovia geto al la neniigejo Treblinka komenciĝis la 23-an de julio 1942. Provizore povis saviĝi tiuj, kiujn bezonis germanaj laborejoj. Al ili apartenis

kredeble ankaŭ Lejzerowicz. Kiam Dratwer laste renkontis lin surstrate en julio/aŭgusto 1942, li aŭdis de li, ke li aliĝis kiel laboristo al iu germana entrepreno¹². Verŝajne nelonge poste la familio Lejzerowicz estis deportita kaj gase murdita. Eble tio okazis komence de septembro, kiam Lidia Zamenhof estis sendita en la mortigejon. Pri la fina sorto de Lejzerowicz Dratwer eksciis, ke la nazioj “trenis lian filineton, edzinon [Regina] kaj lin, ĉiun aparte, en vagonarojn” direktitajn al Treblinka.

Kiel ni plej trafe karakterizu la homon kaj esperantiston Lejzerowicz? Mi volas nomi lin “radikala esperantisto”. En *Plena Ilustrita Vortaro* oni trovas la jenan klarigon de “radikala”: “Iranta ĝis la radikoj, atinganta la fundamenton, trafanta la bazajn principojn”. Ĝuste tio plej bone karakterizas Lejzerowicz. Li ĉiam sentis sin unuavice ligita kun la radikoj de Esperanto, kun la idealoj de Zamenhof. La forto de

¹⁰ Lejzerowicz aludas, ke por la pakaĵoj Jakob David Applebaum (1877-1964), poldevena judo vivanta en Anglio, pretas pagi al Manuel de Freitas. Tiun ankaŭ polaj judoj en Lisbono monsubtenis: *Esperanto* 37. 1941, n-ro 490, p. 2.

¹¹ Helena Zamenhof (1874-1940), la vidvino de Felikso, mortis en la Varsovia Geto pro tifo.

¹² I. Lejzerowicz, “Kvarope ni babilis...”, *Nia Gazeto* 1. 1934, n-ro 11/12, p. 3.

lia konvinko donas al ni imagon pri tio, kiom efikis tiuj idealoj inter la samtempuloj de Zamenhof, la pioniroj, kaj kian grandan rolon ludis inter ili judoj kiel Lejzerowicz.

La Bulonja Deklaracio de 1905 celis iom bridi la pionir-epokan idealismon por malfermi al Esperanto pli vastan uzeblon. Kontraŭdiroj de tiam regis en la movado, inter la esperantistoj. Iuj akcentis la praktikan utilon, aliaj nepre emfazis la originan idealon, denove aliaj volonte parolis pri la interna ideo, sed samtempe, nome de la principo de neŭtraleco, timis konkretigi ĝin. La kontraŭdirojn la movado iel-tiel sukcesis elteni – tiel longe, kiel oni povis esperi pri principe favoraj eksteraj kondiĉoj, pri progreso sur la vojo al paco, demokratio kaj egalrajteco.

La esperojn pri laŭgrada progreso detruis la nazioj. Ili senkaŝe deklaris batalon al t.n. “judaj popolinterfratigaj iluzioj”. Tio estis militdeklaro al la homaro kaj ĝiaj fundamentaj valoroj. La alproksimiĝantan danĝeron multaj esperantistoj, iom naivaj, iom oportunistaj, ne vidis. Estus nejuste kulpigi ilin nun – multegaj homoj ekster la Esperanto-movado kondukis simile, ignorante la nazian minacon al la homaro. Estas konforme al la naturo de la homo ne povi imagi al kiuj kulminoj kaj abismoj de teruro iros la nazia reĝimo.

Tial des pli granda estas la signifo de Lejzerowicz. Inter la esperantistoj neniu tiel frue, tiel klare kaj tiel senkompromise protestis kontraŭ la monstra ideologio kaj krimaj faroj de la nazioj, neniu tiom avertis, alarmis kaj vokis al batalo kontraŭ ili en la nomo de defendo de la Zamenhofaj idealoj. Lejzerowicz – li mem kalkulis sin inter la “nerebonigeblaj” Zamenhofanoj¹³ – bazis sian argumentadon ne sur teorioj de antifaŝismo, de klasbatalo aŭ cionismo, sed sur la pura deziro defendi simple la bazajn homajn valorojn. Estis la krio de homo, kiu vidis sin vundita en la fundo de sia koro, ĉe sia radiko. Kaj irante al la radikoj, li trafis la bazajn principojn de la Esperanto-movado. Pro tio mi nomas lin “radikala esperantisto”.

Lejzerowicz ĉiam kredis je venko de domo. Ni ne scias, ĉu ĝisfine li konservis tiun fidon. La fantazio ne sufiĉas por konsciigi al ni, kiel li eble pensis en la lastaj tagoj, horoj, minutoj de sia vivo. Sed tiel longe, kiel vivas Esperanto, lia idealo, ne

mankos al ni vortoj por esprimi en tiu lingvo, en nia lingvo, niajn sentojn de respekto kaj admiro al Izrael Lejzerowicz.

Tio ĉi estas pli-ampleksigita versio de prelego farita en 2000 kadre de la Internacia Kongresa Universitato en Tel-Avivo.

Fumo super la koncentrejo Treblinka



Da – nekutimaj uzoj

Memstaraj *da*-esprimoj

Normale *da*-esprimo staras tuj post sia kvantesprimo, sed okaze *da*-esprimo staras sola. Tiam normale la kvantesprimo troviĝas en alia loko de la frazo (nekutima vortordo). Iajoje tamen la kvanta vorto estas subkomprenata:

- ***Da reĝidino estis sufiĉe multe.* = *Estis sufiĉe multe da reĝidinoj.***
- ***Da ŝafoj kaj bovoj li havis multe.* = *Li havis multe da ŝafoj kaj bovoj.***
- ***Da homoj piedirantaj estas malpli, preskaŭ neniom.* = *Estas malpli, preskaŭ neniom, da homoj piedirantaj.***
- ***Da pulvo ni havas kiom vi volas.* = *Ni havas tiom da pulvo, kiom vi volas.***

Specialaj okazoj

Normale oni ne uzu *da* antaŭ frazparto difinita per *la*, *tiu(j)*, *ĉiu(j)* aŭ poseda pronomo, ĉar tia frazparto montras ion limigitan kaj individuon. Ankaŭ personaj pronomoj reprezentas difinitajn individuojn: *ili* = *la viroj*, *la knaboj* aŭ simile; *ĝi* = *la tablo*, *la infano*, *la muziko* aŭ simile. Tamen iajoje, en maloftaj frazoj, tia frazparto aŭ persona pronomo tamen montras specon. Tiam, tute logike, oni povas uzi *da*, ĉar la uzo de *da* ne vere dependas de formalaj reguloj, sed de la efektiva senco:

- *Provajn numerojn ni elsendos, kiam ni havos sufiĉan nombron da ili.* Ili reprezentas ĉi tie *provaj numeroj*, ne *la provaj numeroj*. Ili estas do ĉi tie nelimigita, kaj *da* estas ĝusta. Ĉi tia uzo de persona pronomo pri nedifinita, nelimigita, afero estas tamen sufiĉe malofta. Plej ofte oni do ne uzas *da* antaŭ personaj pronomoj.

- *Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn.* Ĉi tie temas pri ŝtofospeco (nelimigita afero). Per *tiu ĉi* oni almontras specimenon de tiu ŝtofospeco. La specimeno estas limigita, sed oni parolas pri la ŝtofospeco ĝenerale, ne nur pri la specimeno. Tial *da* estas taŭga. Oni povas ankaŭ renversi la klarigon, dirante, ke ĝuste la ĉeesto de *da* devigas kompreni la frazparton *tiu ĉi ŝtofo* kiel specan esprimon malgraŭ la difinilo *tiu*. (Efektive *tiu* similas ĉi tie al *tia*, kaj oni povus eble opinii, ke ...*da tia ĉi ŝtofo* estus preferinda.)

Malnova uzo

En la komenca tempo la reguloj por *da* estis ankoraŭ nefiksitaj. Tial oni povas en malnovaj tekstoj trovi ekzemplojn, kiuj ne sekvas la regulojn pri *da* en PMEG: *La nigra maro levis la grandajn pecegojn da glacio alte supren kaj briligis ilin en la forta fulmado.* Pli bone: *la grandajn pecegojn de glacio.* Ne temas pri tio, kiom *da* glacio estis, sed pli vere pri tio, el kio konsistis la grandaj pecegoj. En la sama alineo estis ankaŭ la jena frazo kun *de*: *Ĉirkaŭe naĝis grandaj montoj de glacio, el kiuj [...] ĉiu elrigardis [= aspektis] kiel perlo.*

“Da-ismo”

En parola Esperanto disvastiĝis malĝusta maniero uzi *da*, kiun oni povas nomi “*da-ismo*”. En tiu uzo *da* ne havas postan esprimon, kies rolon ĝi povus montri. *Da* ĉesis esti rolmontrilo. Tiam *da* nur montras, ke la antaŭa esprimo estas kvanta:

- **Mi havas multe da.**
- **Kiom da vi volas?** *Da* ĉi tie **ne** rilatas al la posta *vi*.
- **Ili kunportis tiom da, ke ĉiu povis ricevi iom da.**

Luj diras, ke temas pri ordinara subkompreno:

- *Mi havas multe da mono.* → **Mi havas multe da.**
- *Kiom da viando vi volas?* → **Kiom da vi volas?**

En tia subkomprenado oni tamen normale forlasas ankaŭ la rolvorteton: *Li estas instruisto de lingvoj.* → *Li estas instruisto.* Ne: **Li estas instruisto de.** Tial, se oni volas forlasi la vorton post *da*, tiam oni forlasu ankaŭ *da*.

Oni do diru simple: *Mi havas multe. Kiom vi volas? Ili kunportis tiom, ke ĉiu povis ricevi iom.* Vortoj kiel *multe*, *tiom* kaj *iom* estas kvantaj per si mem. Ili neniel bezonas *da* por povi esprimi kvantan signifon. Nur se oni volas montri, el kio konsistas la kvanto, oni uzu *da*, sed tiam nepre kun frazparto poste.

Eventuale oni povus akcepti esceptokazajn uzojn de memstara *da* post vortoj, kiuj ne estas per si mem kvantaj, se tio helpas eviti miskomprenon. Ekz.: *Mi volas skatolon da.* = *Mi volas tiom, kiom enhavas skatolo.* / *Mi volas skatolon.* = *Mi volas tian ujon.* Sed konstanta uzo de memstara *da* post ĉiu kvantesprima vorto nur pezigas kaj malbeligas la lingvon. En la skriba lingvo memstara *da* apenaŭ aperas, ĉe bonaj aŭtoroj neniam.

Noto: Tamen indas mencii la poemon “La Velŝipo Magdalena” de William Auld (sendube unu el la “bonaj aŭtoroj”), en kiu aperas (en versio de la poemo verkita aparte por la muzikgrupo Kajto) la *da*-ismaĵo “trio da” en la buŝoj de krudaj maristoj, de kiuj oni atendas nekleran kaj nenorman lingvaĵon.

Ŝajnas, ke *da-ismo* estas simptomo de pli profunda miskompreno. Uzo de memstara *da* montras, ke oni pensas, ke *da* apartenas al la antaŭa esprimo, ne al la posta. Tiam la posta esprimo estas ĉefvorto: *mi havas multe da mono.* Konsekvence oni volas uzi N-finaĵon en tiaj ĉi frazoj, ĉar *mono* estas nun objekto: **mi havas multe da monon** (simile al: *mi havas multan monon*). Kaj efektive frazoj kiel **mi havas multe da monon** relative ofte aperas. Kulpas pri tio ĉi interalie multaj lernolibroj, kiuj instruas *da* kvazaŭ ĝi apartenus ĉefe al la antaŭa vorto. La *da-ismo* eble rilatas al la *tiom-kiom-ismo* – ĉiama uzado de *kiom* kaj *tiom* anstataŭ *kiel* kaj *tiel* por montri gradojn. Eble por la *tiom-kiom-istoj* (kiuj ofte estas ankaŭ *da-istoj*) *kiom* kaj *tiom* estas unuavice gradaj, kaj tial ili eble sentas, ke oni devas aldoni *da* por montri, ke temas pri kvanta signifo.

Iuj opinias, ke tia ĉi uzo de *kiom/tiom da* sen posta O-vorto estas motivata de deziro eviti misaŭdon de *kiom* aŭ *tiom* kiel *kion* aŭ *tion* (ĉar *da* estus sensenca post *kion* aŭ *tion*). Tio estas respektinda motivo, sed laŭ mi multe pli taŭga solvo estas uzi *kiel/tiel multe* (aŭ *kiom/tiom multe*), se sola *kiom* aŭ *tiom* povus esti misaŭdata. Tia elturniĝo estas pli klara kaj tute laŭregula. Anstataŭ *neniom* taŭgas *nenia kvanto*, se

estas risiko de misaŭdo. Simile *ia kvanto* ofte povas laŭbezone anstataŭi la vorteton *iom*. *Ĉiom* entute aperas nur tre malofte, kaj tiam ĝi laŭsence nur margene distingiĝas disde *ĉio(n)* en tiaj realaj uzoj, en kiuj iuj emus uzi *ĉiom da* sen posta O-vorto. Laŭbezone tamen *la tuta kvanto* estas taŭga kaj klara anstataŭaĵo.

Literaturaĵoj

Robert Kamiński

Centa mortodatreveno de Antoni Grabowski

Okaze de la centa datreveno de la morto de la patro de esperanta poezio, ni rememoras du liajn poemojn. La prezentitaj poemoj devenas de la kolekto aperinta en 1913 kun la titolo: "El Parnaso de Popoloj".

Saluto el Varsovio

Samideanoj, akceptu vi
Korajn salutojn el Varsovi'!

Akceptu ilin, tra l' tuta mond'
Disportu ĉien al nia rond'.

Diru, ke ankaŭ sur pola ter'
Batas la koroj por sankt-esper',

Ke ankaŭ tie, apud Vistul',
Renkonte brilas amik-okul',

Kaj etendiĝas fidela man',
Sonas: "Bonvenu, samidean'!"

Kvankam la nokto ĉirkaŭas nin,
Ni kredas: Tago brilos en fin'.

Leviĝos fine la ora sun',
Kie nur steloj flagretas nun.

Ektondros laŭte triumfa kant'
Pri fina venko de l' esperanto';

Do mi nur preĝas: Ho, donu Di',
Ke ĝin ekaŭdu ankoraŭ mi!

Jubilea kantato

Feliĉa la semanto estas,
Printempe kiu semis grenon
Kaj en aŭtuno festas
De bonrikolt' solenon.
Feliĉa, kies kor'
Pri granda verko revis,
Kaj el la revo-flor'
La frukton elricevis.

Arbeto, kiun, Majstro kara,
Vi plantis ĉe Vistul-river',
Elkreskis ĝis lazuro klara,
Etendas branĉojn ĉirkaŭ ter'.
Sub ĝi kolektis milojn
La jubilea nova sent', (nova sent')
Kaj ligas terofilojn
Neŭtrala fundament'.

Krakovaj muroj ĝoje sonas,
Dum lernantaro multnacia
Dankeme Majstron kronas
Per verdo laŭrfolia.
En niaj koroj, granda hom',
Stariĝas monumentoj;
Benata via nom'
Ĝi vivos, vivos tra jarcentoj!

Eĉ la malfacila tempo povas krei fruktojn. Nun ni prezentas verkon de nova interesa poetino Božena Róžanek el Szczecin.

Božena Róžanek, kanto

La kvaranteno por ni...

Vi lavu ĉiom!...

Nemulte krom...

Ne faru, ne iru, ne ternu, ne diru

Kaj restu en dom'!

Saluton, la VIVO, saluton, REVENO

Saluton, ESPERO dum la

KVARANTENO!

Saluton, la SANO, saluton, HUMORO

Saluton, ESPERO, de vivo TREZORO!

La domo kaj Vi

Kiel bela ĝi!

Ni povas labori kaj pensi, memori

Kaj lerni pli...

Saluton, LABORO kaj la AMIKECO

De vivo FAVORO, de vivo BELECO!

Saluton, AMIKOJ, saluton, la HOMOJ

La plenaj de ESPER', feliĉaj en DOMOJ!

Ŝanĝiĝas la mond',
de vivo rond'

La kapo, la koro, la lingvo, parolo

Por Vi – respond'.

Saluton, la VIVO, saluton, REVENO

Saluton, ESPERO dum la KVARANTENO!

Saluton, la SANO, saluton, HUMORO

Saluton, ESPERO, de vivo TREZORO!

La Kvaranteno

1. Vi lavu ĉi - om!... Nemulte krom... Ne faru, ne iru,

ne ternu, ne di - ru Kaj restu en dom Sa - lution, la VIVO sa -
Sa - lution, la SANO, sa -

lution RE - VENO, sa - lution ES - PERO, dum la KVARANTENO!
lution, HUMORO, sa - lution ES - PERO, de vivo TRE - ZORO

Paŭlo S. Viana el Brazilo

Kapti okazon por edukiĝo

Mi jam diris plurfoje, ke la revuo “Monato” tre plaĉas al mi, kaj ke mi opinias, ke ĝi meritas vastan apogon de la esperantista komunumo. Denove mi asertas tion, post kiam mi ricevis la numeron de junio 2021. En ĝi oni povas legi tre interesajn artikolojn en elegantaj stilo kaj grafika aranĝo. Plej impresis min la intervjuo en la rubriko “Aktuale”, kun la flandra psikologo **Rakoen Maertens**, kiu reprezentas Universalan Esperanto-Asocion ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. Li estas nepo de la iama UEA-prezidanto Grégoire Maertens.

Al “Monato” li estis intervjuita pri malagrabra temo: falsaj novaĵoj, kiuj nuntempe epidemiece diskuras la mondon per la sociaj retoj. Kaj tamen, malgraŭ la dorneco de la temo, oni legas liajn konsiderojn kun sento de espero kaj ekvilibro. Fakte li doktoriĝas kaj preparas tezon pri la maniero sin defendi kontraŭ tiuj misinformoj. Jen kelkaj sobraj opinioj de la saĝa, juna psikologo:



- eblas trejni homojn per iaspeca “inokulado-teorio”, kvazaŭ ia vakcino kontraŭ mensogaj mesaĝoj; per speco de ludo, oni lernas pri la metodoj kaj teknikoj, uzataj de la kreantoj de tiaj mesaĝoj;
- trejnado kaj atentigado pri falsaj novaĵoj estas necesaj kaj oni devas konstante aktualigi la kapablon de homoj percepti kaj eviti ilin;
- oni devas senpage diskonigi al la tuta mondo metodojn por sin defendi kontraŭ mensogoj en la reto;
- homoj malkontentaj pri sia vivo estas pli facile trafebblaj per falsaĵoj;
- homoj emas kredi pri tio, kio estas kongrua kun iliaj antaŭaj opinioj kaj vidpunktoj; tiu estas la kriterio, ekzemple, laŭ kiu ordinare oni elektas ĵurnalon, kiun oni ĉiutage emas legi;
- polusiĝo estas nuntempe tutmonda fenomeno, kiu malhelpas sobran analizon de faktoj; oni devas eduki homojn akcepti kaj pripensi kontraŭajn opiniojn kaj informojn, se oni volas alpreni sintenon proksiman al prudento;

- la esperantista komunumo enhavas homojn de la plej diversaj politikaj flankoj, kaj estas favora kampo por praktikado de toleremo, respektemo kaj malfermiteco al kontraŭaj vidpunktoj, sen konfliktoj.

Finleginte la intervjuon, oni neeviteble ekpensas, ke la maltrankviliga fenomeno de falsaj novaĵoj estas tamen laŭta alvoko al la homoj, por pli da edukiĝo, por pli da kleriĝo kaj sendependa analizkapablo. Mensogoj ĉiam okazis en la historio de la homaro. Kiam ĝi okazas, troviĝas mensoganto, kiu senskrupule agas, kaj aŭskultanto, kiu senkriterie akceptas la mensogon. Estas eble krei defendojn kontraŭ tia fenomeno, per reedukiĝo! Dankon, d-ro Maertens!

Leterkesto



La antaŭa prezidanto de ILEI *Mireille Grosjean*
La nova prezidanto de ILEI *Ahmad Reza Mamduhi*

Nova ILEI-estraro kaj VEKI-2

Al VEKI-2 aliĝis 156 personoj el 42 landoj. La 54-a ILEI-kongreso, kiu duafoje okazas virtuale, kaj tial nomiĝas ankaŭ VEKI-2 ofertas tre gravajn debatojn, interesajn prelegojn kaj plaĉajn koncertojn. Okaze de la 9-a de aŭgusto, la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj kaj Lingvoj, okazis granda debato kun pluraj podianoj altnivele kompetentaj pri tiu temo. Ĉiuj programeroj aperos en la retejo de ILEI ĉe Youtube: Esperanto+Edukado ILEI.

La Komitato de ILEI kunsidis dimanĉe la 8-an kaj marde la 10-an de aŭgusto kadre de la 54-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI.

Dum kunsidoj okazis elektoj al ILEI-estraro. Elektiĝis kiel prezidanto Ahmad Reza MAMDUHI, kiel sekretario Elena NADIKOVA, kiel kasisto Karine ARAKELJAN. Plie elektiĝis Laura BRAZZABENI, Alessandra MADELLA, Radojica PETROVIC, Fernando PITA kaj Marija JERKOVIC. Do la Ligo havas 8-personan estraron por la tri sekvaj jaroj.



Stefan MacGill

Virtuala IKUE-Kongreso

La Virtuala Kongreso de IKUE okazis ĉe la platformo ZOOM inter la 14-a kaj la 2-1a de aŭgusto, t.e. inter la festotagoj de du ĉielaj patronoj de IKUE, sankta Maksimiliano Kolbe kaj sankta Pio la 10-a, papo. La ĉiutaga programo estis oficiale kvinhora, sed plurfoje oni restis en agrabla diskuto. Al la kongreso aliĝis sepdeko da

esperantistoj el 22 landoj (Aŭstrio, Benino, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kongo, Koreio, Kroatio, Kubo, Pollando, Rumanio, Slovenio, Svislando, Ukrainio), inter kiuj sesdeko aktive partoprenis (pluraj eĉ de la ripozlokoj aŭ de vojaĝoj).

La temo "IKUE: hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ" estis la okazo prikonsciigi pri IKUE kiel asocio kun pli ol centjara historio, kiu dum sia historio havis plurajn obstakligajn periodojn. Oni pridiskutis demandojn kaj problemojn de la nuntempa agado de IKUE (internacia kaj de la sekcioj) kaj kiel plej rapide provi solvi ilin. La fina diskuto pri tiu temo estis ligita al la "Mi kaj IKUE": Kion ĝi signifas por mi; kial mi membras aŭ deziras membriĝi? Kion mi ricevis de IKUE? Kion IKUE povos fari por mi (kion IKUE alportis al mi?) Kion mi povus doni al IKUE kaj al la katolika E-movado ĝenerale? Pluraj promesis ankaŭ skribe respondi, kaj oni esperas baldaŭ kompletigi la diskuton.

La komuneco post la pasintjaraj Virtualaj Tagoj dum la lastaj monatoj pli fortiĝis, kaj jam de pluraj monatoj la katolikaj esperantistoj renkontiĝas ĉe la platformo ZOOM ĉiutage je la 20:15, UTC+2 (informoj: ikue.reto@gmail.com).



Jerzy Dryja,

Reta renkonto kun Przemysław Wierzbowski

Jen la ligilo al la informo, kiun mi trovis sur la retpaĝo de la varsovia "DOM SPOTKAŃ z HISTORIAŃ". Esperanto-tema renkonto kun Przemysław Wierzbowski en Fejsbuko kaj Jutubo la 23-an de sep. 18:00 h.

<https://dsh.waw.pl/3682-bliski-nam-swiat-jezyk-przeciwko-nienawisci-spotkanie-online,prg>

Kalendaro de Esperanto-aranĝoj

Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2021

29-31.07-2021	Pol'and'Rok - PollandRok (eks-Woodstock) Memzorga renkontiĝo de mojosaj, festemaj esperantistoj kadre de la rokmuzykfestivalo. Lotnisko (flughaveno) Makowice-Ploty.	http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php andim@gmx.li
25.07-1.08.2021	94-a (reta) Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda	Sennacieca Asocio Tutmonda Bjalistoka Esperanto-Societo sat.bialystok.pl

7-14.08. 2021	Kristana Kongreso (kadre de 70-a KELI-kongreso) en Legnica	Katolika Esperantista Ligo internacia https://keli.sea-vroc.eu/
4.09.2021	Nacia Legado en Bjalistoko. Prezento de Esperanto-traduko de „La moraleco de sinjorino Dulska”	Bjalistoka Esperanto-Societo, https://espero.bialystok.pl/eo
1-9.09. 2021	54-a Internacia Esperanto-Feriado en Łądek-Zdrój	Silezia Esperanto-Asocio pomer@wp.pl
10-12.09. 2021	„Esperanto sur strando” en Sopot Temo „Urbo kaj akvo”	Triurba Esperantista Asocio "Torento" https://www.facebook.com/groups/ESPERANTOWSOPOCIE
12.09.2021	100-a naskiĝtago de Stanisław Lem. Prezento pri Esperanto-traduko de „Solaris”. Ekspozicio de diverslingvaj eldonoj.	Bjalistoka Esperanto-Societo, https://espero.bialystok.pl/eo
12.09. 2021	9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021 - koncerto de venkintoj	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl
17-19.09. 2021	36-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES 2021	„Esenco“ Poznań, http://www.arkones.org/pl NE OKAZOS
10.2021	45-aj Esperanto-Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE NE KONFIRMITA
11.2021	Glivicea Rendevuo de Praktikantoj kaj Uzantoj de Esperanto GRUPE 2021	PEA-filio en Gliwice NE KONFIRMITA
10-12. 12.2021	22-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj	Bjalistoka Esperanto-Societo
28.12. 2021 04.01.22	13-a Junulara Esperanto-Semajno JES en Wittenberg (Germanio)	Pola Esperanto-Junularo Germana Esperanato-Junularo www.pej.pl

Universalaj Kongresoj de UEA

17-24.07. 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto en Belfasto (Nord-Irlando) okazos en virtuala formo (2-a Virtuala UK)	Universala Esperanto-Asocio uea.org
-------------------	---	---

1-8.08. 2022.	La 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 okazis nur virtuala kongreso. UK en tradicia formo UK okazos en 2022	Universala Esperanto-Asocio uea.org
------------------	--	--

Elektitaj renkontiĝoj en najbaraj landoj

17-22. 10.2021	9-a EMA Esperantista Migrado Aŭtuna en la Palatinata Arbaro, okcidenta Germanio	www.esperanto.de/eo/ema-eo , ema@esperanto.de
9-17.07. 2022	56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) en Klaipėda, Litovio	Litova Esperanto-Asocio litova.ea@mail.lt , anasturte@gmail.com , http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

Diverse, facile, bonguste

Adam Wilkus

Refreŝiga nutraĵo

Ingrediencoj: 1 radiko de kreno, almenaŭ 2-3 pomoj.

Recepto: Senŝeligu la krenradikon kaj raspi ĝin. Senŝeligu la pomojn kaj ankaŭ

raspu ilin. Donu ĉion en poton. Miksu fajne raspitan, freŝan krenon kun raspitaj, sukaj kaj acidaj pomoj, kaj jen la bongusta, spica, kruda nutraĵo estas preta. Ĝi estas sukoplena, dolĉa kaj iom pikanta, depende de la kvanto de kreno kaj pomoj uzitaj. Neniuj spicaĵoj estas bezonataj. Antaŭ ol manĝi, metu la poton en fridujon, por almenaŭ kvaronhoru. Servu la manĝaĵon dum tagmanĝo, aŭ manĝu ĝin aparte.

La salato kun freŝa krenradiko estas serĉata manĝaĵo, ĉar ĝi ne nur havas relative akran acidan guston kaj specifan bonodoron, sed ankaŭ havas resanigan rezulton por malvarmumoj kaj reŭmatismo. Ĝi estas bone digestata kaj ĝia konsumo efikas bone al la intestoj.

Bonan apetiton!



Aŭtoro: Ichok Kacnelson

Titolo: **La kanto pri la murdita juda popolo**

Tradukinto: Mikaelo Bronŝtejn


Eldonisto: Ars Libri

ISBN: 978-83-63698-52-2

Eldonjaro: 2021

Formato: 210 × 210 mm, 200 paĝoj, malmola kovrilo, ilustrita. Dulingva eldono (kun la jida originalo), aldonaj piednotoj kaj biografio de la aŭtoro.

Juda Literaturo, Serio Nordo-Sudo n-ro 2.



Przemysław Wierzbowski

Ichok Kacnelson (1886–1944) estis juda pedagogo, tradukisto, poeto kaj dramisto, verkanta en la hebrea kaj la jida. Antaŭ la Dua Mondmilito li verkis popularajn kantojn, fabelojn kaj teatraĵojn por infanoj. Dum la milito li ekloĝis en la varsovia geto, el kiu al la ekstermejo Treblinka estis forportitaj liaj edzino kaj du filoj. Kun la plej aĝa filo Kacnelson partoprenis la ribelon en la geto, sekve, post kiam li ricevis la pasporton de Honduro, oni transportis lin al Vittel en Francio. Tie, de oktobro 1943 ĝis januaro 1944, estis verkata *La kanto pri la murdita juda popolo*, lia plej fama teksto, unu el la plej gravaj atestaĵoj de la Holokaŭsto. Sud-Amerikon Kacnelson neniam atingis: la 1-an de majo 1944 lia vivo finiĝis en la gasĉambro de Aŭŝvico.

La kanto pri la murdita juda popolo, estas la verko skua per doloro, malespero kaj teruro. La dek kvin kantoj esprimas komunecon kun *majne tojte* – kun „miaj mortintoj”. Kaj ĉefe kun la edzino Ĥana kaj ambaŭ pli junaj filoj, Bencjon kaj Jomele, kun la tuta familio kaj ĉiuj konatoj, kun la eminentaj personoj de la kultura kaj socia vivo, kaj fine kun ses milionoj da viktimoj en Treblinka, Sobibór, Auschwitz, Bełżec kaj *fun noch, fun noch, fun noch!* („el ĉie, ĉie, ĉie!”). Kacnelson starigis por ili ĉiuj la monumenton sur la tombo.

Minimuma Esperanta-pola kaj pola-Esperanta vortaro por la lernolibro *Sukceso per Esperanto* de Edward Malewicz

Sukceso per Esperanto estas la plej nova Esperanto-lernolibro por poloj, verkita de Edward Malewicz¹⁴. En ĝi la aŭtoro utiligis siajn vastajn metodikajn sciojn kaj multjarajn spertojn en la instruado de la lingvoj angla kaj Esperanto. La lernolibro *Sukceso per Esperanto* konsistas el tri volumoj. La du unuaj volumoj enhavas materialon por komencantoj, kaj la tria, por mezprogresintoj. La tria volumo enhavas



materialon malmulte konatan, malmulte komprenatan kaj malmulte (aŭ eĉ tute ne) uzatan de polaj E-parolantoj: participojn, kunmetitajn tempojn en la aktiva kaj pasiva voĉoj kaj kelkajn fremdajn por poloj lingvajn konstruojn, ekz. atribuajn ag-propoziciojn kaj eĉ-propoziciojn, perfektan kondicionalon kaj antaŭ

La lernolibron *Sukceso per Esperanto* akompanas, verkita de la aŭtoro kaj antaŭ nelonge eldonita de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado *Minimuma Esperanta-pola kaj pola-Esperanta vortaro*. La eldonon financis neesperantista organizaĵo - Helpa Societo de sankta Frato Alberto. La vortaro havas formaton A5, nombras 263 paĝojn kaj distingiĝas per bela kovrilo.

La vortaro en la Esperanta-pola parto enhavas ĉiujn vortojn, troviĝantajn en la lernolibro *Sukceso per Esperanto*, kompletigitajn per la plej ofte uzataj vortoj el la Baza Radikaro Oficiala de la Akademio de Esperanto. Danke al tio ĝi povas esti utila ankaŭ al mezprogresintoj, kiuj ne uzas la lernolibron.

La pola-Esperanta parto de la vortaro ne estas inversaĵo de la Esperanta-pola. Ĝia celo estas helpi al la lernantoj formuli simplajn, memstarajn eldirojn en Esperanto, precipe pri la temoj de diversaj entenataj en la lernolibro buŝaj

¹⁴ Edward Malewicz estas diplomito de la Supera Lernejo pri Fremdaj Lingvoj de la Varsovia Universitato kaj magistriĝis en la Instituto pri Aplikata Lingvistiko ĉe la sama universitato. Li estas aŭtoro de kvar Esperanto-lernolibroj kaj de metodika konsillibro por Esperanto-instruistoj.

templaboraĵoj. La pola-Esperanta vortaro havas karakteron didaktikan. Plej precize kaj komplete estas en ĝi prilaboritaj la kapvortoj, kies Esperantaj ekvivalentoj kaŭzas al poloj la plej grandajn malfacilaĵojn. Estas ankaŭ menciinde, ke la vortaro enhavas multe de grava kaj interesa vortprovizo, interalie tiu ligita kun la disvolviĝo de la civilizacio, kiel *saĝtelefono*, *bankaŭtomato*, *retbabili*, *rapidmanĝejo* k.s.

La vortaro de Edward Malewicz ne estas tipa minimuma vortaro. Ĝi estas riĉa je ekzempla materialo kaj abundas je frazeologiaĵoj. Krome, se kapvorto havas kelkajn signifojn, ili estas kursive indikitaj en krampoj, kaj se ĝi apudiĝas kun iaj prepozicioj, ili estas prezentitaj per grasa tiparo. Ankaŭ valoras menci, ke en la vortaro troveblas kelkaj (mildaj) sakraĵoj kaj aliaj tabuecaj vortoj kaj esprimoj (*damne!*, *fek!*, *amoro*, *amori*, *malsaĝa kiel ŝtipo*). Tiutipaj vortoj kaj esprimoj ĉiam vekas ĉe la lernantoj interesiĝon kaj admiron al Esperanto, ĉar ili konvinkigas, ke ĝi estas riĉa, vivanta kaj plenrajta lingvo.

Forpasis

La 22-an de aŭgusto 2021 en Krakovo forpasis 90-jaraĝa samideano, **Stanisława Szostak**. La entombigo okazis la 25-an de aŭgusto sur la tombejo *Prądnik Czerwony* ĉe la str. Powstańców 48 en Krakovo. (sektoro H-CXLII-88, vico orienta, loko 12)
Kun la granda malĝojo, Grażyna Porada – Krakova Societo Esperanto

El fotogalerio de Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki

8-aj Esperantaj Tagoj de Staszów 25-29.05.1994

La aranĝon organizis la loka Esperanto Klubo gvidata de Andrzej Sochacki kunlaborante kun la Urba Estraro kaj la Urba Kulturdomo.

Loĝado kaj tuta programo okazis en la ripozdomo *Chańcza*, ĉe la artefarita lago, 15 km for de Staszów

En la aranĝo partoprenis 115 personoj el Pollando kaj gastoj el Germanio, Slovakio, Brazilo, Ukrainio kaj Britio. Dum la solena malfermo partoprenis la loka urbestro kun la Urba Estraro, reprezentantoj de la Vojevodio Kulturdomo el Tarnobrzeg, la direktoro de la loka kulturdomo kaj lokaj ĵurnalistoj.

Jen la programo:

- Zita Dittel, Ryszard Kwarciany - Kurso por komencantoj.

- Stanisław Świstak - Esperantaj neologismoj.
- Alfred Dietrich – pri religio Bahai, filmo kaj prelego.
- Marian Kostecki - malfermo de la ekspozicio "Esperanto en monda filatelo".
- Jadwiga Dziegielewska - muzika recitalo.
- Wojciech Usakiewicz – E-kurso por progresantoj.
- Vespera bivakfajro kun popola muzikensemblo.
- Lidia Ligeza - poetika programo.
- Sankta Meso kun vizitado en la historia urbeto Szydłów.
- Renkontiĝo kun Antoni Golonka.

Dum la aranĝo okazis ekskurso al la reĝa kaj historia urbo Sandomierz el la 16-a jarcento, situanta ĉe la riveroj Vistulo kaj San. Nuntempe, en Sandomierz filmistoj realizas la polan krimfilmserion "Ojciec Mateusz", la ekvivalento de la itala serio "Don Matteo".



Parolas Alfred Dietrich el Germanio

Antaŭ ripozejo en Hańcza

Andrzej Sochacki kaj G. Mattos kun edzino Maria





Foto: A. Sochacki

Gazetara ekspozicio



Foto: A. Sochacki

Dum la malfermo kantas Jadwiga Dziegielewska



Foto: A. Sochacki

Prelegas Marian Kostecki



Gastoj dum la malfermo




Ewa kaj Dariusz Caban sur la ĉefplaco en Sandomierz



Ĉe sinagogo en Szydłów

Adam Wilkus

Krucenigmo pri mamuloj



1. Vivanta sole, malgranda mamulo, protektata besto, kies supro estas kovrita per grizbrunaj pikiloj kaj ventro estas kovrita per blanka kaj griza feloj. La besto havas etajn okulojn kaj mallongajn, rondetajn orelojn, preskaŭ tute kaŝitajn en la felo, kaj mallongan voston. Speciala muskola sistemo, al kiu estas fiksitaj la pikiloj, permesas al la besto levi ilin pro danĝero kaj samtempe volviĝi en pilkon, danke al kio nek ĝia buŝo nek ĝiaj kruroj estas videblaj. Ĝi estas bonega naĝanto, grimpulo kaj nokta migranto. Ĉefaj eroj de ĝia dieto estas teraj insektoj kaj helikoj, sed ĝi formangas ankaŭ amfibiojn, birdovojn, fungojn, fruktojn; ĝi kapablas manĝi bufojn kaj ĉasi serpentojn, ĉar ĝi estas imuna al ilia veneno.

2. Dekkelk centrimetrojn longa, preskaŭ blinda, nigrahara, insektovora mamulo, vivanta en la tero. Ĝi fosas subterajn tunelojn. Apero de montetoj, produktitaj dum la fosado de subteraj kavoj kaj pasejoj, videblaj en ĝardenoj kaj herbejoj, estas malgranda katastrofo por la kultivisto, ĉar la besto difektas de sube radikojn de plantoj. Krom en ĝardenoj kaj flughavenoj, ĝi estas protektata besto.

3. Masklo de la granda, remaĉanta mamulo, bredata ĉefe por sia viando, sia lakto kaj sia led, sed ankaŭ por sia forto, en la pasinteco uzata kiel tirbesto, kaj nun plu kiel spektaklobesto en toreo. Laŭ ĝi nomiĝas unu el la konstelacioj de la zodiako.

4. Tre socia mamulo, kiu kunekzistas en grandaj grupoj, vivante en ternestoj aŭ en stakoj de falintaj rokoj. Ĝi uzas laŭtajn fajfojn kiel signalojn por komunikado, speciale en danĝero. En malvarmaj regionoj ĝi hiberniĝas dum vintro. Ĝi estas ekstreme endanĝerigita, protektata besto.

5. Rabobesto, kiu sin defendas per elŝprucigo de tre fetoranta likvaĵo kontraŭ la atakanto. Ĝi havas longan, delikatan malhelbrunan ĝis bluete nigran hararon;

blanka strio de kapo sur la nuko forkforme disiĝas. Ĝi atakas abeluojn kaj estas imuna al abelpikoj kaj eĉ al veneno de serpento.

6. La ĉiovora rabobesto, kiu havas brilan flavbrunan, ĝis malhelbrunan hararon; sur la gorĝo ĝi havas flavan ĝis oranĝan makulon. Ĝi loĝas en arbaroj, kutime kun granda parto de koniferoj kaj efike surgrimpas arbojn. Tiu besto furaĝas nokte, serĉante manĝon kaj ŝirmejon. Ĝi ofte kaŝas sin sub kapuĉo de aŭto, elektante plejparte tiujn, kiuj estis parkumitaj post mallumo, pro la varmece en la motora kupeo, ĉar tio kreas favorajn kondiĉojn por la besto travivi malvarmajn noktojn kaj reguligi la digestan procezon. Ĉi tiuj bestoj devas mordi ion kaj ofte damaĝas hidraŭlikajn aŭ elektrajn liniojn en aŭtoj, ekzemple bremslinioj, malebligante al ŝoforo uzi la aŭton.

7. Mamulo el la subfamilio de montaraj antilopoj, kun abunda hararo kaj vertikale kreskantaj kornoj, fleksitaj malantaŭen. Ĝi estas protektata besto kaj fariĝis la emblemo de la pola kaj la slovaka Naciaj Parkoj de Tatra-montaro.

8. Ronĝulo, vivanta en akvo kaj surtere, karakterizita per konstanta kresko de incizivoj, la dentoj adaptitaj por mordi. Ĝi havas dikan korpon, kun mallongaj kruroj, kaj platan voston remilforman. Tiu besto povas konstrui en rivero aŭ lago digon el koto, ŝtonetoj, lignostumpoj kaj branĉoj, por bari akvon. Ĝi ŝatas loĝi ĉe akvorando kaj konstruas la elirejon de sia loĝejo sub akvo, malfacile troveblan.

Zamenhof/Esperanto-Objekto

Robert Kamiński

Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 3

Ekde kreado de la internacia lingvo Esperanto, pasis 133 jaroj. Jam dum la vivo de ĝia kreinto, esperantistoj en la tuta mondo honoris lin, nomigante stratojn per la nomo de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Antaŭ kaj post la morto de la Majstro aperas en la tuta mondo tiaj monumentoj, placoj, parkoj, memortabuloj, ŝipoj, kaj eĉ astroidoj. Kreskanta Esperanto-movado sammaniere honoras ankaŭ aliajn aktivajn membrojn.

Ankaŭ en Pollando - patrujo de Esperanto, ekde la jaro 1919, aperas diversaj objektoj kun nomoj kunligitaj kun L. Zamenhof kaj E-movado. La impona nombro de ili konstante kreskas. La sube prezentita listo montras ĉiujn, ĝis nun registritajn, tiuspecajn objektojn en Pollando. Mi volas prezenti la polan ZEO-liston en la sekvaj ses numeroj de „Pola Esperantisto“.

Mian registradon de ZEO en Pollando mi komencis en la jaro 1996. Registradon de ZEO-j en la mondo komencis *Hugo Röllinger*, per la libro „Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj, en 54 landoj”, kiun eldonis UEA en 1997. Ekde

tiu jaro mi serĉas kaj registras ĉiujn objektojn, dediĉitajn al nia majstro kaj Esperanto-movado.

Ni kune kompletigu kaj korektu la liston. Se vi trovos novan, ne registritan ZEO-n, aŭ se vi havas pli detalajn informojn pri ĝi, bonvolu kontakti min. Jen mia retadreso: rk-lodzo@wp.pl. Vi ankaŭ povas viziti la fejsbukan retpaĝon pri ZEO: <https://www.facebook.com/groups/128827667179539>.

Ĉu vi memoras kaj zorgas pri ZEO en via ĉirakŭaĵo? Kontrolu, ĉu ĝi ekzistas. Purigu tabulon, metu florojn ĉe la monumento (eĉ artefaritajn). Montru, ke ekzistas homoj, por kiuj ĉiu ZEO estas grava.

N-ro	Situo	Objekto	Ekzistas de la jaro
132.	Międzygórze, roko sur insulo	Esperantlingva tabulo	1974
133.	Międzygórze, rivero Wilczka 50°13'51"N 16°46'00"E	Insulo Esperanto (ne indikita post inundo en 1997j.)	?
134.	Milanówek, kv. „Wojska Polskiego”	Zamenhof-strato	1987
135.	Mysłowice	Zamenhof-strato	?
136.	Myszków	Zamenhof-strato	?
137.	Niepokalanów, monaĥejo	Esperantlingva tabulo	1974
138.	Nowa Sól	Zamenhof-strato	1963
139.	Nowy Sącz	Zamenhof-strato	1960
140.	Olszanka, ĉe la domo nr 70, (17 km de Nowy Sącz)	Esperanta-kapeleto	21.08.1983
141.	Olsztyn, kartalo „Zatorze”	Zamenhof-strato	1961
142.	Olsztyn - Kudypy	Esperanto-arbo „Lariko Ludoviko”	27.06.2009
143.	Ostrów Wielkopolski	Zamenhof-strato	1960
144.	Otwock	Zamenhof-strato	1931
145.	Piła, kvartalo „Staszycy”	Zamenhof-strato	?
146.	Piotrków Trybunalski	Zamenhof-strato	1986
147.	Piwniczna	Domo “Esperanto”	?
148.	Płock, tombejo ĉe Aleja Kobylińskiego	Esperanta surskribo sur tombo de Zenon Ilnatowicz	1911
149.	Police, kv. Księcia Bogusława X	Zamenhof-strato	?
150.	Poznań, kvartalo „Św. Roch”	Zamenhof-strato	16.02.1960
151.	Poznań, str. Matyi 2, 52.401513N, 16.921545E	Baro Esperanto	2018,
152.	Przemyśl, kv. Bakończyce	Zamenhof-strato	?
153.	Pszczyna, 49.97323, 18.95018	Zamenhof-strato	?
154.	Radom, kv. Rajec Poduchowny	Zamenhof-strato	?
155.	Radom, kv. Rajec Poduchowny	Kazimierz Bein - strato	?
156.	Radom, kv. Rajec Poduchowny	Esperanto-strato	?

157.	Rokitniki, (apud Tczew) str. Leśna 11	Esperantlingva tabulo sur ŝtono „Las Esperanto Arbaro“	21.07.2005 12. ³⁰
158.	Ruda Śląska, kv. Halemba	Zamenhof-strato	?
159.	Rybnik, kv. Niewiadom Górny	Zamenhof-strato	?
160.	Rzeszów, en centro de la urbo	Zamenhof-strato	1977 (?)
161.	Sanok, 49.56388, 22.186626	Zamenhof-strato	?
162.	Siedlce, 52.16786, 22.28010	Esperanto-strato	1960
163.	Ślupsk, Parko al Jerzy Waldorff, ĉe la str. W. Jagiełły 1	Zamenhof-monumento	19.07.1960
164.	Ślupsk	Zamenhof-strato	1960
165.	Ślupsk, str. Zamenhofa 5	Esperantlingva-murpentraĵo	5.10.2017, 11:00 h.
166.	Sopot, (en centro de urbo)	Zamenhof-strato	1959
167.	Sopot, ĉe la strato Smolna	Esperanta-memorŝtono	26.07.1959 (?)
168.	Sopot	Ŝtono kun surskribo „Esperantoweg dąb“	1927 (?)
169.	Sopot, ĉe la strato Smolna	Esperanto-arbo (kverko)	31.07.1927, 26.07.1959
170.	Sopot, ĉe la strato Smolna	Esperantlingva-informtabulo	2013
171.	Sopot, ĉe la strato Smolna	Rivereto kun esperantlingva nomo „Torento” (potok)	01.01.2014



⇐ En la 1963 okazis en la Kulturdomo de Kłodzko polaĉeĥa amika kunveno. Sur la foto: Stefan Pomorski (dua maldekstre) kaj Edward Wojtakowski (kvara maldekstre) ambaŭ el Wrocław kun grupo de ĉeĥaj esperantistoj en „Esperanto-Parko” en Kłodzko. (la foton sendis Edward Wojtakowski)



Tabulo sur ŝtono en „Esperanto-Parko” en Kłodzko



Tulipo Esperanto kaj
klematito Esperanto



NIA FOTOGALERIO



Varsovia omaĝo de Antoni Grabowski (legu artikolon ĉe la paĝo 3)



Partoprenantoj de Kristana Esperanto-Kongreso en Legnica 8-15.08.2021